

APERAS CIUTAGE

REDAKTAS
ANT. SLANINA

VERDA
DE
JOKS

AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO 1947


31.VII.1947.

Varboparolo al neesperantistoj.

Sinjoroj kaj sinjorinoj, ĉu vi volas vojaĝi, ĉu vi volas viziti multajn landojn de la terglobo? Jĉs, en viaj okuloj mi vidas ardan deziron kaj jam la respondo: jam de mia plej frua aĝo mi arde deziras ekvidi la tutan mondon, sed tuj en via penso vi demandas, kiamaniere vi interkompreniĝos. Tiom da lingvoj oni ne povas ellerni. Kaj jen, mi estas ĉe la ker-
no de malfacilaĵoj. Multlingveco, nekompreno, malfido. En la tempo de la granda tekniko: trajno, vaporŝipo, aviadilo, telegrafo, telefono, radio, televido oni devas havi internacian helplingvon. Tiu ĉi lingvo estas Esperanto. Lerne de Esperanton, viaj deziroj plenumiĝos. Antaŭ ol viaj monrimedoj sufiĉos por vojaĝo, vi ĝuos feliĉan mondvojaĝon per korespondado. Per korespondado vi trovos ĝamikojn en la tuta mondo. Vi ekscios pri la moroj, kutimoj, vivmaniero, laboro de diversaj popoloj. Kaj poste, se via sopiro efektiviĝos kaj vi faros grandan vojaĝon kun verda stelo /nia Esperanta simbolo/ vi trairos tutan mondon, trovante ĉie amikojn. Mi rekomendas al vi: Lerne Esperanton.
A. Slanina.

Dr. A. P i t l i k:


Ĉ u _ a _ m _ i _ k _ e _ c _ o _ a ŭ _ a _ m _ o _ .



Ĉu tempon malŝpari, knabino amata,
ludante per brilaj vortetoj,
ĉu ilin vicigi kaj ordi, por fine
penetri al iaj sekretoj?

Ĉu flustru ni, kio en niaj animoj,
mistere kaŝita, postrestas?
Sur mia tempio jam haroj griziĝas,
eĉ vi plu infano ne estas!

Pokalo da amo, por ni preparita,
surtabelle invitas nin nune.
Ĉu ni do hezitu, amata knabino,
ĝis fundo eltrinki ĝin kune?



Trad. prof. M. Lukiš.

NOVAĴOJ.

Dnes odpoledne koupání.
Na pozvání skautů večer táborový oheň ve Starých Splavech.
Sraz v 19 hodin "U Jelena",
odchod přesně ve 20 hodin, neboť nám pošlou spojku naproti.
Připravte si repertoár.

F E R N.

Svisa radiostacio elsendas sur mallonga ondo 31,47 metroj paroladojn de diversnaciaj delegitoj, partoprenantaj la Universalan Kongreson.

Sabate parolis f-ino Zamenhof. Elsendoj okazas ĉiutage je la 18a horo de la svisa tempo. Kiu volas aŭskulti, ni rekomendas kontroli tempon de la 17a horo ĝis la 19a horo. Raportu al ni, ĉu vi kaptis la ondon.

S A L U T O.

SEL-on salutas kore konata ekonomo, Dro Marko Weirich.

Diras forĝisto al nova lernanto: "Vi devas fari precize tion, kion mi al vi diros, aŭ vi fariĝos fuŝulo!" "Nun rigardu tiun ĉi pecon da fero. Tenu firme la martelon." "Jes". "Bone, kiam ni movsignos per kapo, ekbatu!" La forĝisto konsciiĝis nur en malsanulejo.

LINGVA ANGULO.

La subjunkcioj d u m kaj ĝis funkcias ankaŭ kiel prepozicioj. Ekzemple:

Dum li ne estis hejme, oni pri-rabis lian loĝejon. Longa tempo pasis, ĝis oni elkonstruis tiun domon /subjunkcioj en tempaj subpropozicioj/. En la frazo: "Lia patro estis honesta homo, dum li estas fripono" d u m funkcias konjunkcie.

Mi sendos la artikolon ĝis dimanĉo. Apetito venas dum la manĝado. /Ĝis kaj dum funkcias kiel prepozicioj/.

La subjunkcio ĉ a r funkcias ankaŭ kiel konjunkcio:

Mi ne povas tien iri, ĉar mi estas malsana. /subjunkcio/
Li parolas perfekte, kio estas vere miriga, ĉar nur antaŭ nelonge li eklernis la lingvon. /konjunkcio/.

ANEKDOTOJ.

Aŭto faligis iun malpli junan fraŭlinon - feliĉe nenio okazis al ŝi. Kiam ŝi konsciiĝis, demandis policano, kiu intertempe zorgis pri ŝi: "Via adreso, fraŭlino?" Ŝi elspiris rugigante: "Poste restante".

Malfacila problemo.

"Se vi volas sendi ion en redakcejon, skribu nur unuflanke".

"Nu jes, sed sur kiu flanko?"